

# Till Taster

## Mirindaj Mamoj

M.M.P.S.



**Till Taster**  
**Mirindaj mamoj**

Erotika novelo

2018

# Enhavo

Atentigo  
Neatendita vizito  
Dormĉambro  
Songoj  
Esploroj  
La solvo  
Gekolegoj  
Reveno  
Konsento  
Planoj  
Elprovado  
Preparado  
Rekrutiĝo  
Nova kafoklaĉo  
Premiero  
Virinoj  
Malamikoj  
Perspektivoj  
Ŝanĝoj

## Atentigo

Tiu erotika novelo estas farita nur por plenaĝuloj. Ĝi prezentas seksumajn agojn. Se vi ne ŝatas tian prezentadon, tiam nepre ne legu tiun novelon.

## Neatendita vizito

La laŭta babilado el la loĝĉambro senaŭdigis eĉ la tintadon de la telefonaparato. D-ro Tom Simon miris pri tio. Ĉu estis neatenditaj vizitantoj? Kial Lucie, lia edzino, ne estis informinta lin? La pordo al la loĝĉambro ne estis tute fermita, kaj ebligis partan rigardon al la sceno. Vere, tri fremdaj junaj virinoj sidis tie, kaj eĉ Lucie ĝis nun ne rimarkis, ke li alvenis. Ili ĉiuj estis enprofundiĝintaj en iu verŝajne tre grava temo. Sed Tom ne volis kredi siajn okulojn. Ĉu vere unu de la virinoj ne portis bluzon? Ne, ne, ŝi eĉ demetis sian mamzonon, kaj pozis kun belaj formoj antaŭ la aliaj. Tom kaŝiris mallaŭte al dua etaĝo, sed tion registris Lucie, kiu nun tute ekscitite kuris al li. „Kara, ĉu via laboro pli frue finiĝis?“, ŝi demandis aldonante: „Pardonu, hodiaŭ estas nia 'virina kunveno'. Bonvole atendu ankoraŭ duonhoron en via ĉambro, mi poste klarigos ĉion al vi“. Tom ricevis nur paseman kiseton. Tute perplekse li turniĝis kaj iris al sia ĉambro.

Virina kunveno sen mamzono? Tom ne komprenis tion. Vere, hodiaŭ li iomete pli frue forlasis sian laboron, sed tio ja ne gravis. Dum la lastaj semajnoj lia edzino ĉiutage revenis hejmen minimume unu horon post li. Kelkfoje li devis atendi eĉ pli longe. Lucie estis profesia aktorino. Ŝi akceptis elstaran rolon en filmprojekto. La tie bezonata labortempo neniam estis antaŭvidebla. Sed hodiaŭ certe estis escepto. Tom provis trankviligi sin. Tamen li ĉiam denove miris pri la nudaj mamoj, kiujn li neatendite spektis. Ĉu la filmprojekto traktus seksajn aferojn? Tom ne povis imagi tion. Li tuj forĵetis tiajn pensojn. Ĉu la virino kun la belaj mamoj estis lesbianino? Lucie certe ne, sed eventuale ĉu sekrete? Tom plurfoje kontrolis la horloĝon. Estis vere longa duonhoro por scivolema viro.

Dume la kvar virinoj pliintensigis la interparoladon. „Lea, estas ja bonega rezulto. Bonvole rakontu plu. Kiel pasis la operacio?“, demandis Lucie kaj Maja petis: „Ĉu mi povas tuŝi kaj palpi viajn mamojn, Lea?“ Kompreneble Lea permesis tion. Ŝi ja fieris, ke la operacio tiel bone sukcesis, kaj volonte klarigis la proceduron: „D-ro Shazid nur bezonis du horojn. Mi ne rimarkis ion ajn pro la plena narkozo. Tri tagojn post la operacio mi devis permanente malvarmetigi miajn mamojn, kaj dum ses semajnoj mi portis specialan mamzonon, kiu apogis ilin. La fadenoj estis jam forigitaj post sep tagoj. Kaj nun vi preskaŭ ne plu vidas cikatrojn“. Lucie dankis Lea-n pro tiu malkaŝema prezentado kaj ĉiuj adiaŭis. Estis la fino de la 'virina kunveno', kaj Lucie rapidegis al sia atendanta edzo.

„Pardonu, Tom, mi forgesis informi vin“, ŝi petegis, kaj tiam ŝi detale klarigis la aferon al Tom. Lucie, nun 35-jaraĝa, dum la lastaj jaroj ofte spertis kreskantajn problemojn. Ne estis facile por ŝi trovi laboreblecon. Multaj aliaj belaspektaj junaj virinoj ankaŭ ofertis sin por ricevi rolon en filmprojekto. Ofte Lucie aŭdis, ke bela figuro tre gravas por aktorinoj. „Kion fari, miaj mamoj nun mal-kreskis? Kial vi ne atentigis min?“, ŝi demandis. Tom brakumis ŝin kun rideto kaj provis doni konsolon: „Mia kara, por mi vi estas bela kiel ĉiam. Mi tute ne rimarkis tion. Krome tiu afero ja ne gravas por mi. Ĝi tute ne difektas mian

amon”.

Sed tio ne konvinkis ŝin. Lucie klarigis, ke ŝi intertempe eĉ kelkfoje suferas pro depresio. Ŝi vere deziras belan korpan aspekton, alikaze ne eblas kontentiga praktikado de sia profesio. Tial ŝi jam delonge pensis pri beliga kirurgio por pligrandigi la mamojn. Ŝi kolektis multajn informojn. Eĉ la prezo ne kaŭzus problemojn. Kun ŝiaj koleginoj ŝi ofte ankaŭ traktis tiun temon. Hodiaŭ ŝi trovis bonan daton por inviti la virinojn, kaj Lea, kiuj ĵus trapasis sukcesan pligrandigon de siaj mamoj, prezentis la rezultojn al ili. „Ĉu vi nun pli bone komprenas min?“, ŝi demandis, tamen ŝi bone rimarkis, ke ŝia edzo verŝajne ne subtenus ŝin. Vere, Tom ne povis doni konsenton. La ideo, ke iu D-ro Shazid metos sian tranĉilon sur la bruston de Lucie, timigis lin. Tro ofte li aŭdis, ke multaj virinoj suferas pro fuŝaj operacioj. Ĉiuj gazetoj raportis pri la uzado de netaŭga silikono por miloj da enplantaĵoj. Ne, operacio nur por bele formita korpo, tion li vere ne povis subteni. Krome li pensis, ke malgraŭ la iomete malgrandiĝintaj mamoj, Lucie ĉiam ankoraŭ estis belaspekta virino. Operacio tute ne estus bezonata. Sed tion ŝi hodiaŭ ja ne volas aŭdi.

## Dormĉambro

La vespero hodiaŭ por Tom ne evoluis laŭplane. Post streĉa laboro li estis esperanta agrablan karesadon kaj ankaŭ sekskuniĝon. Sed ĉu tio nun eblus? „Kara, vidu! Hodiaŭ mi ja povis forlasi la laboron tre frue. Vidu, kion mi aĉetis por vi“, li deloge diris al Lucie, kaj montris boteleton kun multekosta oleo por masaĝo. Li ja sciis, ke ŝi tre ŝatis masaĝon. Lucie kompreneble ankaŭ konis sian edzon, kaj jam komprenis la intencon. „Jes, Tom, mi tuj venos. Vi ja povas prepari la benkon, mi nur duŝas min“, ŝi respondis, kaj tuj poste, kun malseka nuda korpo brakumis sian edzon. Tom ŝercis: „Kaj mi jam pensis, vi estas lesbianino. Vi ja tre intime palpis la mamojn de via kolegino Lea“. „Ne, ne, ne estas tiel. Ankaŭ Lea estas tute normala virino. Ŝi estas edziniĝinta“, replikis Lucie, kaj Tom daŭrigis la mokadon: „Kion vi pensus, se vi revenus hejmen, kaj vidus min en loĝĉambro tuŝante la nudan bruston de juna sportema viro?“.

Lucie bone ŝatis tiun humurplenan komencon de la atendonta amludo kaj kuŝiĝis sur la benkon. La planoj pri la operacio estas nun prokrastitaj. Kun lertaj movoj Tom ŝmiris la oleon sur ŝian haŭton. Ŝi kuŝis sur la ventro, tial li komence masaĝis ŝiajn sidvangojn, dume li kareseme flustris: „Nu, kara, ĉu tio plaĉas al vi? Tiel bone nur masaĝas via nova geja amiko“. „Jes, estas bone, kaj neniam pli pensu pri lesbianinoj“, ŝi respondis. Tom nun premis siajn manojn pli forte sur ŝian dorson, kaj poste knedis ŝiajn femurojn. Li ja bone konis ŝin kaj sciis, ke precipe la traktado de la enaj flankoj estas tre ĝuinda por ŝi.

La masaĝo hodiaŭ daŭris iom pli longe ol kutime. Tom intertempe tre aktive laboris kaj varmiĝis. Tial li demetis ankaŭ sian pantalonon kaj tute nude kontinuis la masaĝon. Lucie nun kuŝis surdorse. Tom stariĝis je la fronto de la benko kaj komencis knedi ŝiajn brakojn, kaj - tre singardeme - ankaŭ ŝiajn mamojn. Por pli bone atingi ilin li devis kliniĝi iomete kaj ŝajne tute hazarde li tuŝis ŝian vizaĝon per la kaco. Kompreneble, tio ne estis hazardo, li bone intencis fari tion. „Ĉu vi povus leki ĝin?“, li petis. Lucie ŝoviĝis kun sia tuta korpo je la fronto de la benko, kaj nun ŝia kolo eĉ fleksiĝis suben. Tom tre ŝatis tiun pozicion kaj karesis ŝian vizaĝon kun lia seksorgano. „Ĉu vi povus fluti min?“, li nun flustris, sed li ne sukcesis. Lucie ne ŝatas suĉi lian kacon. Tom sciis tion, sed li ĉiam provis ŝanĝi ŝian opinion pri buŝa seksumado. Li memoris, ke nur

tre malofte ŝi faris tion. Tamen li ja ne volis interrompi la amludon, sed make li rimarkis: „Ho Lucie, ĉu vi scias, ke estas nun mi, kiu falas en depresion?“. Tio verŝajne taŭgis por instigi Lucie-on. Ŝi tuj forlasis la benkon kaj saltis sur la liston kun la vortoj: „Nun iri, Tom, estas tempo, uzu vian bastonon ĝuste“. Tom ne rifuzis tiun allogon kaj sekvis bona seksumado - ne nur per misiista pozicio.

## Songoj

Malgraŭ la kontentiga amludo tiu nokto Tom komence ne bone dormis. Angoro regis lian songon, en kiu li kaj Lucie rapidege forkuris. Ili fuĝis antaŭ strangan mediciniston, kiu minace montris teruran tranĉilon. Li puŝis brankardon sur kiu troviĝis nigra skatolo kun silikona materialo por mamenplantaĵoj. Feliĉe, ke la fuĝantoj unue atingis la finon de la koridoro kun la ŝtuparo. Ek al la suba etaĝo! Sed tie jam atingis ilin la minace rigardanta malamiko. Li estis ja uzanta la lifton. En la lasta minuto Tom kaj Lucie forsavis sin per salto tra la malfermita fenestro al la ekstera ĝardeno. Finfine ili povis kuri hejmen, kie nun sekvis agrabla parto de la songo. En la loĝĉambro tri junaj nudaj virinoj bonvenigis ilin. Unu aspektis kiel Lea, la koleginino de Lucie. Senpere ili senvestigis la alvenintojn. Unu post la alia karesis kaj flutis Tom. Eĉ Lucie partoprenis la gajan suĉadon, kaj ĉiuj ok manoj masaĝis lian tutan korpon. Ankaŭ Tom povas doni rekompenson. Li tuŝis iujn ajn membrojn kaj provis trovi malsekajn truojn por enigi sian fingron. Kompreneble tiuj songaj movoj efikis, ke Tom ne plu trankvile kuŝis flanken. Liaj brakoj etendiĝis kaj atingis la apude dormantan edzinon, kiu nun subite vekigis.

„Kio okazis?“, ŝi demandis, kaj per tio ankaŭ Tom forlasis sian songon. Li rakontis ĉion, kion li ĵus travivis. Lucie trankviligis lin: „Ne zorgu. Mi ja ĝis nun ankoraŭ ne decidis pri la operacio. Ĉiukaze ĝi okazos ne antaŭ aŭtuno. Nun en printempo kaj poste dum somero ne estus bona tempo por fari tion. Do, estas ankoraŭ multe da tempo, sed la dua parto de via songo vere timigas min. Ĉu vi vere planas seksumi kun aliaj virinoj? Vi ja scias, ke mi estas tre ĵaluza“. „Ne, ne!“, respondis Tom kaj aldonis: „Mi ne volas kokri vin. Tamen mi estas viro, kaj kelkfoje ja aperas la deziroj, kion fari?“. Lucie komprenante donis al li la jenan klarigon: „Ja, ja, tio estas nur songo. En reala vivo la tri virinoj mem estas edziniĝintaj. Se ili havus seksajn rilatojn kun vi, estas klare, ke ankaŭ iliaj edzoj ne povus resti trankvilaj. Verŝajne minimume unu el ili tiam ankaŭ volus seksumi kun mi. Ĉu tio plaĉus al vi?“. Tom dormeme replikis: „Jes, vi pravas, sed vi ja nur timas, ke mi elektus unu el la tri aliaj virinoj kaj amus ŝin pli ol vin, mia ĵaluza birdeto“. Per tiaj vortoj li turniĝis kaj denove profunde ekdormis.

## Esploroj

Mike Kording fiere rigardis sian liston kun la novaj rezultoj. Pri tio li vere ĝojis. Jam multajn monatojn li faris tiujn eksperimentojn. Mike laboris en la sama instituto kiel Tom. Estis la plej grava institucio en la urbeto Novlago. Ambaŭ apartenis al eta laborgrupo, kiu analizis la kreskadon de plantaj histoj. Kiel kutime la financa situacio de la instituto estis tre streĉa. Nur pogute venis subvencioj por la multekostaj projektoj. Tamen la laborgrupo ĝis nun ĉiam sukcese trovis mondonantojn. Nur danke al la inventtalento de Tom kaj Mike la instituto ĉiam denove povis proponi indajn esplorcelojn. Speciale Mike estis vere kreiva kvankam ĉiu gekolego konas lin pro lia kaosa labormaniero. Li evidente neniam

zorgis pri ordigo. Ĉie li senplane lasis kuŝantajn paperojn, ilojn kaj kompreneble ankaŭ la kafotasojn. En lia laborareo nur tre malofte troviĝis libera loko. Nur unufoje en la semajno estas ŝanĝo de la situacio. Nele, la purigistino, nur respektis homojn, kiuj metis ĉion ordeme sur tablo, en ŝranko aŭ en bretaro. Tial eĉ Mike devis fine de la semajno iri al sia laborareo kaj ordigi ĉion, vole-nevole, por savi la valorajn aĵojn. Vere valoraj estis nun la rezultoj de la lastaj eksperimentoj.

Hodiaŭ Mike devis informi sian kolegon Tom. Sed tio ne estis facila afero, ĉar li ja tute sendepende, sen demandi iun, realigis tiujn eksperimentojn. Nur Mona, la juna praktikantino, estis informita, ĉar ŝi jam dekomence kunlaboris kun Mike en tiu afero. Do, hodiaŭ Mike kuraĝis informi Tom-on: „Aŭskultu, kara kolego, kaj ne ridu pri mi, ĉar vi nun verŝajne aŭdos ion pri vere nekutima projekto“. Tom ŝatis sian kolegon malgraŭ lia kaosa labormaniero kaj diris: „Kompreneble, Mike, komencu, mi estas tre scivolema“. Mike heziteme ekparolis: „Mi analizis la efikon de spermo al la kreskado de plantaj histoj, kaj trovis eksterordinaran pligrandiĝon de la ĉeloj kun apartaj proteinoj. Tre interese estas, ke tio funkcias nur se oni aplikas freŝan spermon“.

„Kion vi faris? Tio estas ja nekredebla. Kaj kiu donis al vi la ideon por tiu eksperimento?“ demandis Tom. Nun Mike komencis sian raporton. Unue li tre detale priskribis sian rilaton kun Mona. Jam ekde multaj monatoj evoluiĝis seksaj rilatoj. Kelkfoje post laborfino ili ankoraŭ restis en la instituto, kaj Mona ofte flutis kaj permanis Mike-on. Nur malofte ili ankaŭ sekskuniĝis. Tio ja nur eblis, se la labortablo de Mike donis pli-malpli liberan spacon. Por ĝui pli intiman am-ludon ili de tempo al tempo renkontiĝis en la domo de Mike. Sed estas ja la suĉado en la laborĉambro, kiu gravas por la priskribitaj eksperimentoj. Unu tagon Mona rimarkis, ke estus ja tre bedaŭrinda malŝparo de la spermamasoj, produktitaj de Mike. Tiam ekestis la ideo ne nur gluti la ĉuron. Ambaŭ decidis uzi ĝin por scienca esplorado. Tute hazarde Mike prenis skatolon kun semoj de la akvokreso, kiujn li metis sur kulturmedion en etaj ŝeloj. Intertempe Mona 'rikoltis' la spermon de Mike kaj maldensigis ĝin kun varma akvo. Tiun miksaĵon ŝi disdonis sur la akvokresajn semojn. Post sufiĉa restado en la inkubatoro la ĉeloj estis analizataj. Por kontroli la efikon, aliajn ŝelojn ili traktis nur per varma akvo sen spermo. La mikroskopaj bildoj pri la ĉelkreskado, sub influo de freŝa spermo, estis imponaj.

## La solvo

„Mi povus kisi vin!“ ekkriis Tom, kaj Mike timigite retiriĝis. „Tio povas ja esti la solvo por miaj problemoj!“ klarigis Tom, kiu nun tute malkaŝe rakontis pri la aktualaj problemoj el sia edzeco. Tom konfidis sian kolegon, ĉar tiu ja ankaŭ ne kaŝis ion ajn. Li entuziasme avizis „Mi kaptos du muŝojn per unu frapo. Mia kara edzino certe perdos sian malinklinon kontraŭ midzado, se ŝi ricevus la ŝancon por pli grandaj mamoj!“

Sed la realigo de tiuj celoj ne estis facila. Unue la laborgrupo devis ekzakte pruvi, ke la efiko, kiun trovis Mike kaj Mona, ankaŭ troviĝus en homaj ĉeloj. Estis nova esplora projekto, kaj Tom insistis pri tuja komenco de la planoj emfazante, ke li mem volis investi propran monon por ebligi la aferon. Sed ne nur la mono gravis. Mike rimarkis, ke nun pli granda kvanto da spermo estus bezonata. Li mem ja volonte kontribuis sian ĉuron, sed Mona ja ne povis sorĉi. „Ĉu vi, Tom, ankaŭ povus partopreni kiel spermdonacanto?“, li ridete demandis.

Tom heziteme respondis: „Jes, vi pravas. Estas ja precipe mi, kiu celas al la sukceso de tiu projekto. Kompreneble mi ankaŭ devas doni mian kontribuon. Sed, se Mona tiam helpus ankaŭ min, tion neniam rakontu al mia edzino“. Mike komprenis tion kaj diris „Mi tuj vokas Mona-n, ŝi estas en la apuda laborejo. Bonvole iru for, mi parolos kun vi sole.“

Por Mona ne ekestis problemoj. Ŝi ja ŝatis fluti kaj melki viraĵojn. Krome ŝi povas esti tre silentema. Tion ŝi ja jam pruvis dum la pasintaj eksperimentoj. Restis nur unu problemo. Nele. Kio okazus, se ŝi ĉe freŝa faro kaptus ilin? Tom trankviligis ilin: „Tial ni devas esti tre singardemaj. Ni simple deklaras la projekton kiel tre sekreta afero. Kaj ni ofte uzos la ŝlosilon. Krome ni instalos kurtenojn aŭ eĉ rulkurtenojn.“

Post la alveno de la menditaj ĉelkulturoj la teamo tuj uzis ilin por la planotaj eksperimentoj. „Ĉu vere estas homaj ĉeloj? „ Mona demandis. „Jes“, konfirmis Mike kaj emfazis: „Estas ĉeloj de la virina mammo. Mi ne bezonas preni specimennon de vi. Tion ni nur farus, se la eksperimentoj malsukcesus“. „Tio estas ja bedaŭrinde, la miaj estas la plej bonaj ĉeloj, kaj ankaŭ mi bedaŭras, ke vi nun ne povas admiri miajn apetitvekajn mametojn“, ŝi plendis, sed Tom rimarkis: „Atendu, se nia metodo funkcias, ni volonte testos la aferon. Tiam ni bezonos vian helpon. Certe viaj mametoj poste estos pli grandaj ol antaŭe.“

Sed la eksperimentoj malsukcesis, kaj Mona ankoraŭ ne ricevis la ŝancon elprovi efikan novan rimedon. Mike rimarkis la eraron: „La ĉelkulturoj estis nur traktataj per la miksaĵo el spermo kaj varma akvo. Ni forgesis la influon de la akvokreso! Mi proponas denove komenci la eksperimentojn, sed ĉi-foje ni viroj ĉiutage manĝu salatojn kun multe da akvokresoj“. Tom multe plendis, ĉar kutime li ja preferas manĝi viandon sen legomoj, sed tio ne helpis. Kiu volas sukcesi, tiuj devas unue suferi. Ĉiukaze Lucie vere miris pri la ŝanĝita apetito de sia edzo. Ŝi ja ne estis informita pri la projekto, sed ŝi ne kontraŭis la adaptiĝon de la manĝaĵo al vegetana oferto. Tom nun ankaŭ preferis trinki teon anstataŭ bieron. Lucie eĉ devis prepari teon el akvokreso. Tion ŝi antaŭe neniam estis farinta. Sed neatendite ankaŭ tiu trinkaĵo plaĉis al ŝi.

„Tom, Mike, iru!“ vokis Mona kaj fiere montris la plej novajn fotojn pri la traktataj homaj ĉeloj. Tom konstatis: „Tio estis la ĉefa gajno. Ni sukcese pruvis, ke la metodo, kiun trovis Mike kaj Mona, ankaŭ funkcias ĉe homaj ĉeloj.“ Nun Mona vere ĝojis, ke ŝi povis ludi la unuan 'eksperimentan beston'. Ŝi senhezite senvestigis sian bruston kaj petis Mike-on, ke li tre ekzakte kontrolu la grandecon de ŝiaj mamoj. Kompreneble ŝi mem protokoligis ĉion kaj poste postulis, ke Mike kaj ankaŭ Tom demetu la pantalonojn. Kial? Ŝi nun komencis fluti la du penisojn, melkis kaj denove suĉis ilin ĝis ambaŭ falusoj produktis sufiĉan virlakton, kiun ŝi avide glutis. Poste ŝi nur supraĵe kisis ambaŭ kolegojn sur la vangoj dirante: „Mi ja nun ne devas kisi viajn buŝojn, ĉar tiam vi riskus ankaŭ evoluigi pli grandajn mamojn. Tion viroj ja ne bezonas!“

## Gekolegoj

Tom ĉi-foje tre malrapide paŝis hejmen. Kiel li nun informu sian edzinon pri la sukcesplena esplorado? Aŭ ĉu estus bone ankoraŭ atendi al Mona pro la kreskado de ŝiaj mamoj? Sed tio daŭrus minimume du aŭ tri semajnojn. Kion fari? Li sendecideme eniris la hejman domon. Kie estis Lucie? Li ja alvenis post la oka horo vespere. Tiam ŝi kutime jam sidis en la loĝĉambro. Aŭ ĉu ŝi hodiaŭ estis en la kuirejo por eksperimenti kun novaj vegetaraj receptoj? Tom ne tro-



vis ŝin. Daŭris ankoraŭ du horojn ĝis ŝi venis.

„Kara, mi alvenis“, li aŭdis kaj tiam Lucie komencis raporti pri evidente gravaj aferoj, ĉar ŝia voĉo donis tre hektitan impreson. Ŝi rakontis, ke ŝi jam morgaŭ devus fari longan vojaĝon al Hispanio, kie ŝi restus por tri semajnoj. Tie okazus filmprojekto en kiu ŝi partoprenus kiel ĉefrolulino. Ŝi priskribis la tutan enhavon de la filmo. Ne estis facila afero, ricevi tiun rolon, ŝi vere estis bonŝanculo. Tom tuj brakumis kaj gratulis ŝin. Li kompreneble ne diris, ke tio estas vere plaĉa okazaĵo por li, ĉar li nun ne devis paroli pri sia laboro. „Sed, kara, kiu tiam preparos por mi la vegetaran salaton kaj la teon kun akvokreso?“ li ridete plendis. Sed Lucie ne rimarkis lian hipokritan intencon. Ŝi nur replikis: „Vi ja estas sciencisto. Tiaj homoj ankaŭ en kuirejo famiĝas“.

Tio vere estis bona situacio por Tom. Tri semajnoj sen Lucie. Dum tiu tempo li ja ĉiutage povas aktive kontribui sian valoran spermon por la malsata Mona. Ne estus problemoj kun Lucie. Ŝi ja ne estis informita, ŝi ne sciis. Feliĉe, ŝi ankaŭ neniam imagus, kion planis ŝia 'fidela' edzo. Tom certe sentis kelkajn skrupulojn, sed li trankviligis sin. Ĉio estas ja nur por la scienco! Hodiaŭ li preparis la bongustan herban teon kaj ofertis ĝin kun rostitaj nuksoj al Lucie. Sekvis agrabla nokto kun multaj karesoj. Lucie iomete hontis, ĉar ŝi ne povis informi sian edzon pli frue pri la estonta vojaĝo. Eventuale pro tio ŝi klopodis esti tre bona edzino, kaj tial ili hodiaŭ tre frue iris al la dormĉambro, kie komenciĝis varmega amludado.

La sekvantan matenon Tom akompanis sian edzinon dum la ekveturo al la flughaveno kaj tial iomete malfrue atingis la instituton. Ĉi tie li miris, ĉar la pordo de lia laborejo estis fermita. Sur la parkejo li estis vidinta la aŭton de Mike. Do, estis klare, li jam nun certe ĝuis la traktadon de Mona, kiu vere klopodis plenumi ĉiujn postulojn de la scienco. Tial Tom atendis en la kafejo kaj komencis tajpi kelkajn notojn per sia smartfono. Post kvarona horo la pordo de la laborejo malfermiĝis, kaj Mike kun Mona man-en-mane ankaŭ iris al la kafejo. Tom diris kun severa mieno: „Karaj, mi estas ja la ĉefo en via laborejo. Tiam mi rekomendas, ke vi ĉi tie en la instituto neniam iru man-en-mane. Krome evitu ĉion, kio povus montri vian privatan inklinon. Tio estas necesa por la etoso en nia instituto!“ Mike kaj Mona konsente reagis, kaj Tom nun malavare pagis por la trinkaĵoj, dirante: „Mi jam iras al mia laborloko, la pordo estas ja nun malfermita“. Mona gaje replikis: „Nelonge, la pordo estos baldaŭ denove fermita. Ni ja nur trinkas la kafon kaj tiam revenos!“

Ja, tion komprenis Tom. Mona vere estis diligenta kunulino, pli bone dirite suĉulino, ĉar tuj poste, revenante al la laborspaco de Tom, ŝi komencis dorloti la jam erektiĝintan faluson de Tom. Dum tio ŝi demetis ŝian bluzon, kaj Mike masaĝis ŝiajn - ĉiam ankoraŭ - ne pligrandigitajn mamojn. Tom miris, ke lia kolego ne montris signon de ĵaluzo. Ŝajnis, ke li eĉ mem ĝuis la aktivan agadon de sia amikino. Liaj manoj ankaŭ vagadis sur ŝia korpo kaj baldaŭ atingis ŝian pubon. „Rapidegu, kara“, li petis kaj aldonis: “post via peza laboro mi volas ja rekompensi vin per frandzado“. Evidente la ĉeesto de Tom tute ne ĝenis lin. Sed nun Tom spruĉis sian ĉuron en ŝian buŝon. Ne perdiĝis eĉ unu guto. Ŝi forlekis ĉiun restaĵon de la kaco kaj laŭdis ĝian guston: „Ho, tre bona aromo hodiaŭ. Ĝi memorigas min pri freŝaj herboj, eĉ iomete spica“. „Dankon, Mona. Mi nun denove iras al la kafejo, sed mi donas al vi ambaŭ ne tre longan tempon. Ni devas ja ankoraŭ labori iomete“. Kun tiuj vortoj Tom komprenoplene foriris por kroma kvarono.

## Reveno

La tri semajnoj rapidege forflugis. Sed la rezulto de la sekreta esplorprojekto estis grandioza. Mona fieris pro siaj pligrandiĝintaj mamoj. Post tri semajnoj kompreneble la dikeco de ŝiaj mamoj nur kreskis per 3 ĝis 4 centimetroj, sed ŝi jam sentis la plifortigitan elastecon. Do ŝi devas trakti siajn kolegojn ankaŭ dum la venontaj semajnoj. Sed nun ŝi ne plu tre ofte suĉus Tom-on, ĉar lia edzino revenis, kaj Tom volas ja apliki la metodon al ŝi.

Tom preparis abundan vespermanĝon kun vino kaj dolĉaĵoj por sia edzino. Li aĉetis grandegan florbukedon kaj planis agi tre singardeme. Ŝi nur ne timu, se mi rakontos pri niaj sciencaj rezultoj, li pensis. Tial preskaŭ du horojn li nur aŭskultis ŝin. Vere, ŝi povis rakonti multon pri interesaj semajnoj dum la filmprojekto. La venontan monaton la filmado okazus en la urbo, kaj jam fine de la jaro ĉiu povus spekti la filmon. „Koran dankon pro la mirinda vespermanĝo“, dankis Lucie kaj nun koncentriĝis je sia edzo: „Kion vi faris? Ĉu vi sukcese mastrumis? Ĉu estas novaĵo el la instituto?“.

Tio estis la demando longe atendita de Tom. Li kaptis la ŝancon kaj priskribis la eksperimentojn, kiujn Mike faris helpe de Mona. Lucie jam sciis, ke Mike estis kaosa, tamen talenta laboranto. Nun ŝi krome aŭdis, ke inter Mike kaj Mona evoluigis amrilatoj, vera novaĵo por ŝi. Estis klare, ke Tom silentis pri siaj aktivecoj. Sed li ankaŭ menciis la signifon de la akvokreso, kaj li ankaŭ iomete hontigite konfesis, ke li mem kelkfoje masturbis por apliki spermon al la ĉelkulturoj. Entute li emfazis, ke Mike meritis la laŭron por la genia eltrovaĵo. Tamen li ĝojis pri la bonaj rezultoj kaj proponis, ke nun ankaŭ sia edzino komencu tiun metodon. „Kion vi proponis?“ demandis Lucie timege kaj aldonis: „Ĉu vi vere volas, ke mi suĉu vian penison? Vi ja konas mian malinklinon, mi malŝatas la guston“.

Sed Tom ne rezignis. Li parolis kaj parolis kaj emfazis, ke per tia metodo ŝi ja ne plu bezonus operacion. Kaj li denove klarigis la malavantaĝojn de tiaj proceduroj, pri la fuŝoj de la medicinistoj, pri la netaŭga silikono por la enplantaĵoj, pri la doloroj kaj la nemalaperintaj cikatroj k.t.p. Lucie petis: „Lasu min pripensi la aferon. Hodiaŭ mi estas tro laca. Morgaŭ mi havos liberan tagon, ni povas paroli pli“. Tom ne montris sian malkontenton dirante: „Jes, kara, dormu bone, morgaŭ ni ĝuos la libertempon, sed posttagmeze venos Mona kaj Mike. Mi invitis ilin por kafoklaĉo“. Ĉu vere estis bona ideo, inviti la kolegojn? Tom ne tute certis pri tio, sed li esperis, ke specife Mona povus helpi. Kelkfoje virinoj ja povas tre bone konvinki aliajn virinojn pri tiklaj problemoj.

„Rapidegu, Lucie, hodiaŭ mi ankaŭ ne laboras. Post matenmanĝo ni iros al la naĝejo, kaj poste estus tagmanĝo en greka restoracio, kion vi pensas?“, demandis Tom. „Bona ideo“, respondis Lucie aldonante: „estas pli bone ol resti en la domo. Tie mi verŝajne tro multe pripensus la filmprojekton. Mi bezonas ja ankoraŭ studi multajn scenojn. Sed tio povas atendi“. Do, Tom sukcese komencis tiun tagon. Ili jam delonge ne estis en la naĝejo. Lucie ĝoje konfirmis, ke estis bona ideo iri tien. Kaj post naĝado kaj plaŭdado kreskis malsato, bona bazo por la sekvanta greka tagmanĝo. Ĉe apuda bakisto Tom aĉetis kukon por la kafoklaĉo kun la kolegoj. Tre kontente ili nun iris hejmen, restis sufiĉa tempo por posttagmeza paŭzo.

## Konsento

„Ili alvenis, oni sonorigis“, vokis Tom kaj malfermis la pordon. Ankaŭ Lucie bonvenigis la gastojn. „Saluton, koran dankon pro la vizito, mi kunportis mian fianĉinon Mona“, diris Mike kaj transdonis grandan florbukedon al Lucie. „Ah, tulipoj kaj narcisoj. Kiu diris al vi, ke mi tre ŝatas tiun florojn“, dankis Lucie kaj gvidis la gastojn al la loĝĉambro. Tom ridetis, ĉar kompreneble li informis Mike-on antaŭe. Ĉiuj nun sidiĝis ĉe la granda tablo kaj komenciĝis la hejmeca klafo-klaĉo. Lucie admiris la ŝikan bluzon de Mona. Ankaŭ Tom tuj gvidis siajn okulojn al tiu vestaĵo, sed verdire, verŝajne gravis nur la bela dekoltaĵo. Mona tre fiere prezentis sian belecon kaj ĝojis pro la komplimentoj. Evidentiĝis, ke la virinoj vere ŝatis unu la alian. Mona eĉ ŝovis sian seĝon pli proksime al Lucie kaj prenis ŝian dekstran manon. Tiam ŝi proponis mallaŭte: „Lucie, metu vian manon sur miajn mamojn. Ĉu tio ne sentas bone?“. Lucie miris pri la malkaŝeco de la nova gastino, sed tamen ŝi devis konstati, ke Mona disponis pri vere belaj mamoj. Iomete senĝene ŝi riskis demandi: „Ĉu estas enplantaĵoj?“ Tom, kiu ĝis nun nur estis babilanta kun Mike, pro tiuj vortoj atente aŭskultis. Mona replikis: „Ne, ne. Tion mi ne ŝatas, sed, ĉu mi rajtas paroli pri tiu intima afero, Mike?“.

Nun ĉiuj okuloj estis direktitaj al Mike, kiu komencis iomete balbutante rakonti. Li raportis pri siaj eksperimentoj en la laboratorio. „Ĉu mi ankaŭ parolu pri via rolo, kara“, li demandis Mona-n kaj tuj ricevis la permeson. Mike tre lerte prezentis la aferon, kaj Tom estis tre kontenta, ke li plene forlasis la informojn pri lia implikaĵo. „Mona, mi miras, ke vi povis ŝajne senprobleme gluti la spermon. Mi tute ne ŝatas tiun malbongustaĵon“, kontraŭdiris Lucie. Sed Mona replikis: „Vi malpravas. Mike nur donas bongustan ĉuron. Vi forgesis, ke dum la tuta tempo, ĉiu spermdonanto devas ja trinki herban teon el akvokreso aŭ manĝi vegetaran salaton kun tiuj freŝaj folioj. Tiam la spermo poste vere havas ankaŭ freŝan, ofte eĉ spican guston.“ „Tion mi ne kredas“ rimarkis Lucie kaj demandis: „Kial vi ne diris tion al mi, Tom? Kaj mi havas alian demandon al la sciencistoj. Kial ne sufiĉas ŝmiri la virilakton sur la haŭton de la mamoj?“ Mike povis klarigi la aferon. Li konfesis, ke ĝis nun la scienco ankoraŭ ne havas detalajn sciojn pri tio. Sed ĉiuj eksperimentoj montris, ke nur la freŝa spermo, plej eble sen kontakto kun la aero, havas la dezirindan efikon. Krome tre gravas, ke la virino glutas ĝin. Verŝajne la acido en la stomako aŭ la enzimoj de la intesto ankaŭ influas la rezulton.

Mona ne volis atendi plu kaj enmetis: „Ĉesu nun! Mi ne plu bezonas vian prelegon. Gravas ja nur la sukceso. Kaj ankaŭ estas ja tre ĝojiga agado, ne nur por la viro, ankaŭ por mi. Kion vi pensas, kara Mike, ĉu nun ne estus bona tempo por arda suĉado?“ Mike brakumis ŝin, turnis sin al Lucie kaj Tom kaj diris „Bonvole pardonu ŝin, tiel ŝi estas, ĉiam senzorga kaj malembarasa. Sed tial mi ja amas ŝin“. Tom tuj kaptis la ŝancon kaj replikis ĉirkaŭbrakante sian edzinon: „Kial ne, sentu vin kiel en via hejmo. Ni ja estas amikoj, kaj Lucie, ĉu vi kontraŭus?“ Lucie ne volis esti ludofuŝanto kaj donis konsenton.

Tom elektis belan romantikan muzikon kaj komencis karesi sian edzinon, dume Mike demetis la pantalonon. Mona surgenuis kaj traktis la ankoraŭ malmolan viraĵon. Post kelkaj movoj ĝi atingis admirindan longecon. Tion ankaŭ Lucie vidis, kaj kvankam Tom vere klopodis bone karesi ŝin, ŝi ne povis deturni siajn okulojn de tiu faluso. Ŝajnas, ke la aktiveco de Mona nun ankaŭ atingis ŝin, kaj ŝi komencis senvestigi Tom-on. Tiam Mona vokis: „Atentu, tuj venos la

virlakto!" Ankaŭ Lucie atente spektis la scenon, en kiu Mona glutis la tutan spermon. Nur malgrandan reston ŝi lasis sur sia lango, turnis sin al Lucie dirante: „Kisu min, kaj gustumu“. Lucie estis nun neatendite kaptita de ŝi kaj malfermis sian buŝon, lekis la spermgutojn kaj kontrolis la guston. „Ja, vi pravas, Mona. Mi ne povis imagi tion“, ŝi konfesis. Tiaj vortoj vere stimulis Tom-on. Lia peniso nun ankaŭ malmoliĝis, preta por forta ŝpruĉado. Lucie komence ankorau hezitis iomete, sed tiam suĉis kaj glutis la tutan ĉuron. Jes, ne estis malagrabla gusto, ŝi eĉ lekis la restantajn gutojn de la glano kaj nun turniĝis al Mona kun denove malfermita buŝo. Mona ĝojis, ŝi nun ankaŭ povis kontroli la guston de la gastiganto.

## Planoj

Feliĉa Tom, edziĝinta jam 11 jarojn, kaj nun estis komenco por pli bonaj tempoj, ĉefe, kompreneble, noktoj. Estis bona ideo inviti la gekolegojn Mike kaj Mona. Krome ili ne nur estis gekolegoj. Ili iĝis intimaj geamikoj. Ankaŭ Lucie kontente parolis pri la hieraŭa kafoklaĉo: „Mi gratulas vin, Tom. Vi vere havas agrablajn gekolegojn. Mi ĝojus, se ili baldaŭ denove vizitus nin“.

La matenmanĝo estis preparita de Tom, kompreneble kun teo el akvokreso. Apud la pladoj kun pano, butero kaj marmelado okulfrape montriĝis verda pasto. „Ĉu ni manĝu tion?“, demandis Lucie kaj Tom fiere replikis: „Jes, tio estas pasto farita el akvokreso kaj olivoleo. Vi ja konas la kialon, ĉu ne? Mi ŝmiras ĝin sur mia pano. Estas ankaŭ bona por vi. Niaj eksperimentoj pruvis, ke ankaŭ la metabolo de la virino influas la efikon de nia nova metodo“. Lucie replikis „Ho ve, Tom, kaj mi pensis, ke vi jam nun frumatene preparis memfaritan paston uzante vian ...“, kaj nun ŝi ne plu povis subpremi laŭtan ridadon, ŝi ridis ĝis larmoverŝo. Post kelka tempo ŝi povis denove tute normale paroli kaj adiaŭis, ĉar en la urbocentro estis kunveno pri la filmprojekto. Ankaŭ Tom devis iri al sia laborejo, kie Mike kaj Mona verŝajne jam atendis lin.

La pordo al la laborejo ne estis fermita, la gekolegoj sidis en la konsilejo kaj intense konversaciis. „Bonan matenon, ĉu mi ĝenas vin?“, demandis Tom kaj Mike respondis: „Ne, estas bone, ke vi nun alvenis. Cetere, tre grandan dankon pro la hieraŭa kunveno en via hejmo. Estis tre ĝojiga, ne nur la kuko. Sed hodiaŭ mi proponas paroli pri miaj novaj planoj“. Mike montris papereton, sur kiu troviĝis eta superrigardo, skribita per preskaŭ nelegeblaj literoj. Li klarigis projekton por profesia ekspluato de la nova metodo. La titolo devus esti 'MMPS'. Tio estas mallongigo por 'Mirindaj Mamoj Per Spermo'. „Tio iĝos revolucio rilate al la klopodoj por ricevi pli grandajn mamojn. Sed ni devas esti tre singardemaj“, Mike opiniis. 'MMPS' estis planita kiel tute privata projekto. La tri kunlaborantoj interkonsentis, ke neniu devas paroli pri la uzado de la akvokreso. Tio restu tute sekreta afero. Kaj estus Mona, kiu gvidus la projekton kiel direktorino. Ŝia tempo kiel praktikantino ja finiĝus ĉimonate. Tom kaj Mike restus en la instituto sed promesis doni al Mona ĉian helpon, kiun ŝi bezonus.

La ideo de 'MMPS' estis la jena: En la periferio de la urbo Mona luprenas etan domon. Tie la nova firmao 'MMPS' ofertus la novan metodon por virinoj, kiuj verŝajne volonte pagus altan monsumon por la intima traktado. „Sed kie ni trovas la spermdonantojn?“, demandis Mona, ĉar Tom kaj Mike jam estis okupitaj. Mike konis la solvon: „Ne estus problemo. Mi demandos la junulojn el nia futbalo-teamo. Ili certe ĝojus gajni monon per tia bela laboro“. „Restas nur problemo por mi“, plendis Mona. Ŝi ja devus sekrete prepari amasojn da bon-

gustaj freŝaj salatoj kaj multajn kruĉojn da teo por la junaj spermdonantoj. Verŝajne estus bona ideo konstrui varmkulturejon. Tiam oni nur povus iri en la ĝardenon kaj ĉiam estus ebleco rikolti la akvokreson.

## Elprovado

Lucie interesite aŭskultis la raporton, kiun donis Tom post la vespermanĝo. Ŝi opiniis: „Tio estas bona ideo de Mike, sed mi pensas, ke tiuj planoj tro frue alvenas. Unue ni devas ja pruvi, ke la metodo funkcias ankaŭ por mia korpo. Mona rakontis, ke ŝi jam post du semajnoj rimarkis malgrandan, sed klaran pozitivan efikon, kaj verŝajne daŭrus pliaj du aŭ kvar semajnojn ĝis la efiko vere estas prezentebla“. Tom konstatis tion sed rimarkis, ke frua planado ja ne estus damaĝinta. „Kiamaniere la junuloj volas trakti la virinojn? Mi ne povas imagi, ke tia suĉado povas okazi en publika buroo aŭ simila ĉambro“, demandis Lucie. Tion Tom ankaŭ jam pripensis kaj priskribis sian ideon: „Mi pensas, ke en tiu domo estus eta enirhalo por akcepti la virinojn. Krome estas ofertitaj kelkaj seĝoj kiel en atendejo ĉe kuracisto. En aparta ĉambro oni devas starigi muron aŭ vandon, kiu dividas la ĉambron en du partoj. La unua parto estas por la virinoj, la alia por la junaj viroj. Ili neniam havus la ŝancon vidi unu la alian. En la apartiga muro aŭ vando estus truoj, pli bone dirite, 'feliĉtruoj'. Kion vi pensas?“

Lucie ne konis tiajn 'feliĉtruojn' sed la konversacio pri tiu temo estis vere stimula por ŝi. Ŝi tuj pensis pri la hieraŭa travivaĵo kaj pri la rigida kaco de Mike, sed tion ŝi ne menciis, ŝi proponis: „Kara, ĉu vi povus - nur por testi la aferon - konstrui modelan vandon kun truo? Ni ja hodiaŭ vespere povus kontroli, ĉu tio estus adekvata“. Tom miris pri sia ideoplena edzino kaj tuj iris en la kelon por prepari la apartigan vandon el granda kartono, nur por elprovado. Lucie intertempe ordigis la kuirejon kaj antaŭĝojis la venontan amludon.

